

John Ellerton, The day Thou gavest, Lord, is ended	John Ellerton, Ni estis ja en mano Dia	John Ellerton, Forpasis tiu tag', Sinjoro	John Ellerton, Finiĝas nun alia tago
--	--	---	--

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

*tradukita de Frieder Weigold*

*tradukita de William John Downes*

1. The day Thou gavest, Lord, is ended, The darkness falls at Thy behest; To Thee our morning hymns ascended, Thy praise shall sanctify our rest.	1. Ni estis ja en mano Dia, dum brilis super ni la Sun'. Protektu nin per mano Via dumnokte, Dio, ankaŭ nun!	1. Forpasis tiu tag', Sinjoro, Kaj profundigias la senlum'. Vi gardis nin de ajndoloro. Nin gardu ankaŭ dum noktum'!	1. Finiĝas nun alia tago, jam venis la vesperahor'. Kunvenis ni por adorado plaĉanta al la DiSinjor'
---	---	--	---

2. We thank Thee that Thy church, unsleeping, While earth rolls onward into light, Through all the world her watch is keeping, And rests not now by day or night.	2. La ter' cirkulas ĝis la veno de l' nova tag', ripozas ni dum tiu nokt' en Via beno <sup>2</sup> ĝis la mateno, kara Di'.	2. Ni rotacias en la tagon. En nokta paco dormas ni. Kaj portas lumon trans la maro La suno, kie brilas ĝi.	2. Ni dankas Vin, Savanto nia, ke sur la tuta mondateren' la sankta eklezio Via staradas firme ĉe posten'.
--	--	--	---

3. As o'er each continent and island The dawn leads on another day, The voice of prayer is never silent, Nor dies the strain of praise away.	3. Nun kiam en malhel' fordronas la Sun' en tiu ĉi vesper', multvoĉe Via laŭdo sonas alialoke sur la Ter'.	3. Senĉese kiel la mateno Briladas super tera rond', Eksonas laŭdo pro la beno Al ĉiu sur la vasta mond'.	3. Ruliĝas tero, brilas lumo de ne-ĉesanta maten-glor'. Leviĝas laŭdo, preĝparfumo konstante, kiel dolĉodor'.
---	---	--	--

4. The sun that bids us rest is waking Our brethren 'neath the western sky, And hour by hour fresh lips are making Thy wondrous doings heard on high.	4. Ĉar kiel estas ĉirkaŭanta la Teron lumo de l' maten', senĉese estas plusonanta preĝado de la homoj jen.	4. La suno, kiu ĵus subiris, Ja brilas en plu foral land'! La gloron, kiun ni admiris, Anoncas plu preĝada kant'.	4. Ekdormas ni post sun-subiro; gefratoj en la okcident' vekiĝas kun novtagaspiro Vin glori per vive lokvent'.
--	---	--	---

...

...

...

...

<sup>2</sup>aŭ: dankante Vin pro Via beno, Vin adorante, kara Di'.

<p>5. So be it, Lord; Thy throne shall never, Like earth's proud empires, pass away: Thy kingdom stands, and grows forever, Till all Thy creatures own Thy sway.</p>	<p>5. Ja estas, Dio ĉiopova, senlima Via regno, nin konduku al la tago nova en Via regno je la fin'!</p>	<p>5. Pereas regnoj. Tiel estu! Kaj sole staras via tron', Ke sole via regno re- stu Je fina tag' sub unu kron'.</p>	<p>5. Formortos mon- daj imperioj, sed Via regno kres- kos plu. Al Vi sin cedos di- nastioj, Venkinto estos vi, Jesu'!</p>
--	--	--	--

...

...

...

...

*Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas JOHN ELLERTON (\*1826-12-16 – †1893-06-15), publikigita 1870.*

*Arg-130-255 (2008-11-08 14:47:39)*

*Information about the author can be found on the website [http://www.cyberhymnal.org/bio/e/l/l/ellerton\\_j.htm](http://www.cyberhymnal.org/bio/e/l/l/ellerton_j.htm).*

*Traduko de la Angla poemo “The day Thou gavest, Lord, is ended” de JOHN ELLERTON (\*1826-12-16 – †1893-06-15) en Esperanton de MANFRED RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2004-01-10.*

*Arg-130-257 (2008-11-08 00:42:46)*

*Traduko de la Angla poemo “The day Thou gavest, Lord, is ended” de JOHN ELLERTON (\*1826-12-16 – †1893-06-15) en Esperanton de Frieder Weigold.*

*Arg-130-932 (2008-11-08 14:22:49)*

*Mi, Manfred Retzlaff, ricevis tiun ĉi tradukon de la kanto en 2008-11-06 de sinjoro Frieder Weigold (Birkenstr. 12, D-82178 Puchheim, Germanio), kiu mem faris la tradukon en Esperanto. S-ano Weigold verkis tiun tradukon - kiel li diris al mi - laŭ la germanigo farita de s-ro Raymund Weber. Tiu germanigo estas trovebla en la germana katolika kant-libro “Gotteslob” (= Laŭdo de Dio), n-ro 981, pli nova eldono. La teksto kun la muzik-notoj troveblas ankaŭ en la retejo [http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,\\_SS\\_Benedictus\\_XVI,\\_Ves\\_er\\_in\\_der\\_Kathedrale\\_in\\_Muenchen,\\_GE.pdf](http://www.documentacatholicaomnia.u/01p/2006-09-10,_SS_Benedictus_XVI,_Ves_er_in_der_Kathedrale_in_Muenchen,_GE.pdf).*

*Traduko de la Angla poemo “The day Thou gavest, Lord, is ended” de JOHN ELLERTON (\*1826-12-16 – †1893-06-15) en Esperanton de WILLIAM JOHN DOWNES (\*1892 – †1987).*

*Arg-130-302 (2004-02-04 11:38:05)*

*Tiu ĉi traduko aperis en la Ekumena Diksio “Adoru”, eldonita en 2001 de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) kaj Kristana Esperanta Esperanto-Ligo (KELI), kanto numero 153.*